

LA ESTRARO de Internacia Sciencia Asocio Esperantista:

PRESIDANTO: Prof. D-ro Bož. Popović, (Ognjena Price 80, 11000 BEOGRAD, Jugoslavio)

VICIPRESIDANTOJ: Prof. D-ro C. Stjep-Bowitz (Camilla Colletta vei 3, OSLO 2, Norvegio
D-ro Wim de Smet, (Hertendreef 12, 2180 KALMHOUD, Belgio)

ĜENERALA SEKRETARIO: D-ro J. Kavka (Lužna 7, Vokovice, PRAHA 6, Ĉeĥoslovakio)

SEKR. -KASISTO: Prof. Ing. Mm. Šaponjić, (Svetosavska 23a, dvor., 11000 BEOGRAD, Jugoslavio)

ALIAJ ESTRARANOJ: Prof. D-ro P. Kustaanheimo, (01800 KLAUKKALA, Finnlando)
André Heck (rue du Chéra 49, 4000 LIÈGE, Belgio)

KONSULTA KOMITATO de la redaktoro:

D-ro A. Alabault
Lic. M. Ĝivoje
Prof. J. Ĝörllich
D-ro P. Neergaard
Prof. S. Reiersøl
Prof. C. Stjep-Bowitz

ĈEFA kaj RESPONDECA REDAKTORO Prof. D-ro Bož. Popović, Og. Price 80, 11000 BEOGRAD, Jug.

LINGVA KONTROLANTO Prof. M. Šaponjić
Svetosavska 23a (dvor.), 11000 BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA (I. S. A. E.)

Aperas sesfoje jare

Por membroj de ISAE la jarabono (kun la kotizo al ISAE) 50 steloj = 12,5 ned.gld. =
4,40 us.dol. aŭ 70 jug.din.

La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Ekster la delegita reto de ISAE la jarabono 5,00 us. dol. = 80 jug.din.

Izdaje nauĉna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije, Terazije 42 Beograd = jugosl.
podružnica Međunarodnog nauĉnog društva esperantista). Za izdavaĉa: odgovorni urednik
Prof. Dr. Bož. Popović, (Ognjena Price 80, Beograd)

Stampa: "Čaĉanski glas", Uzun-Mirkova 1, Beograd

Po pribavljenom mišljenju Republiĉkog Sekretarijata
za kulturu SR Srbije, broj 413-99/72-03 od 10.X.1972.
časopis nepodležje plaćanju osnovnog poreza na promet.

SCIENCA REVUO

UDK 001/05/ = 089.2

Vol. 24, n-ro 2-3/100-101/
20. 5. 1973.

Aperas sesfoje jare. Jarabono 56 steloj, 14 ned.gld., 5 us.dol., 80 din.

/DUOBLA/ FILOLOGIA NUMERO 4/5
- kunredaktita de S. Ĝuĝev -

El la enhavo:

- I. Szerdahelyi: Kelkaj gnoseologiaj problemoj de..... Esperanto
A. Albault: Du literoj-multaj problemoj / pri la esperantaj j kaj ŭ/
F. G. Blázquez: Klasifo de oracioj
H. D. Maas: Kvanta karakterizo de vortara riĉeco de tekstoj
A. D. Duliĉenko: La lingvonimiko - ĝia esenco kaj problemoj
V. Zlotnikova: Semantiko
A. Lienhardt: Modela prononco de la inter-lingvo Esperanto

KELKAJ GNOSEOLOGIAJ⁺ PROBLEMOJ DE SCIENCA ESPLORO DE ESPERANTO

(I. SZERDAHELYI, BUDAPEST, HUNGARIO)

La evoluado kaj evoluperiodoj

1.1. Esperanto - kiel objekto de scienca esploro /ni nomu tiun sciencan
branĉon "Esperantologio" / estas kompleksa fenomeno, kies ĉefaj konsistigaj
elementoj estas:

1. LINGVO - lingvokulturo kaj esplorado;
2. LITERATURO - verkado, literaturteorio, stilistiko;
3. INSTRUADO kaj edukado;
4. MOVADO - ideologio, organizado, administrado, propagando.

Ĉi kvar facetoj de la sama socia fenomeno, kvankam diverskarakteraj, str-
ikte interrilatiĝas kaj formas dialektikan tuton: la tuto /"Esperanto" / povas ev-
loui nur tiam, se ĝiaj konsistigaj komponentoj evoluas proporcie. La troevolua-
do aŭ subevoluo de iu aŭ alia komponento rompas la internan harmonion de la
sistemo kaj bremsas la evoluadon de la tuto.

1.2. Ĝis nun plej klare / kaj preskaŭ ekskluzive / la literaturistoj observis
konkrete la evoluvojn kaj limigis la periodojn. Kvankam estas malfacile fiksi
kaj space, kaj tempe iajn mejloŝtonojn / el tiu vidpunkto la cirkonstancoj de ev-
oluado tre similas al la mezepoka latina literaturo / - tamen, kvazaŭ interkon-
sente, kaj KALOCSAY /1/ kaj AULD /2/ apartigis tri periodojn. Tiu "tri-fa-
zeco" estas akceptebla, eĉ se oni ne akceptas la ne tute motivitajn "etikadojn"
de AULD / "primitiva romantismo, polurita romantismo, metafiziko" /.
⁺ La terminon "gnoseologio" mi uzas en la senco: "sciencoteorio", "esplorteo-
rio".

[Paraleligante la mezepokan kaj Esperanto-literaturon en mia artikolo, aperinta en la plej aŭtoritata hungarlingva literatura revuo [3] mi prunteprenis de A. SZERB la periodigon, nominte la 1-an: heroo-eklezia, la 2-an: kavalira /"Ho, kavaliroj de nova pentekost 77 kaj la 3-an: civila./"Se non e vero..."]

Eble estus multe pli simpla kaj pli konkreta, ankaŭ pli vera la sekva nomenklatur:

1. Primitiva
2. Klasika
3. Moderna

Tiu klasigo estas baze kronologia - sed ne ekskluzive. Kelkaj verkoj kaj verkistoj tempe antaŭis aŭ, male, postrestis sian periodon. Sed tiudirekta evoluado estas okulfrape palpebla.

1.3. Estas tute komprenebla fenomeno en Esperanto, ke la plej konkreta manifestiĝo de la evoluado estas observebla en la literaturo: la skriba tekstoj estis ja la unua realigo de la lingvo.

En la naciaj lingvoj la "akto" - /teksto, precipe akustika/ - en diakrona plano - antaŭas la sistemon /lingvo/: en etnika medio naskiĝas la parolo el kiu poste oni konstruas la sistemon. En Esperanto tiu fenomeno kronologie estas inversa: unue estis kreita la lingvo el kiu poste oni generis la tekstojn. Tiu inversa fenomeno rezultigis la senkondiĉan realiĝon de bazaj normoj /Fundamento/ kaj certigis la regulecon, konsekvencon kaj logikecon /eĉ se ne tute perfektan, tamen maksimuman/ de la lingvo. La diakronio en Esperanto estas multe pli simpla, pli klara kaj pli konsekvenca ol en la naciaj lingvoj. Sed ni ne povas konsenti kun la konstato, ke Esperanto estas akronia lingvo /kiel tion asertas, cetere tute bonintence, ANTAL [4]/. Rezigni pri la diakronio signifus nei la evolueblecojn en Esperanto. Sed tiu evoluado estas precize sekvebla, ekzakte, preskaŭ matematike explorebla kaj mezurebla.

1.4. La lingva mekanismo funkcias du-direkte:

a/ se la individuo intencas komuniki informafon, li generas la tekston el la ekzistanta kaj funkcia leksiko de la koncerna lingvo, obeante la normojn de la lingva aŭtomato.

Ekz.: La frazo: "Sur la tablo estas multaj libroj" estas generita el Esperanto-leksiko laŭ la Esperanto-aŭtomato.

Sed: "Na table multo libr" - aŭ

"Sur la stolo estas mnogaj knigoj." /Кр. ruse:

На столе много книг

ne transdonas informafon, ĉar ne estas generiĝaj el Esperanto.

b/ Ĉiu komunikaĵo antaŭkondiĉas du polusojn: oni devas ne nur transdoni informafon, sed ankaŭ transpreni, percepti kaj kompreni ĝin.

La kadroj de la lingvo-aktoj estis strikte fiksitaj far la Fundamenta Gramatiko kaj Universala Vortaro: oni povis transdoni nur tiom kaj tiajn-nivelajn tekstojn /komunikaĵojn/ kiom kaj kian-nivelan ebligis la du bazaj dokumentoj. Sed, ĉar tiuj du dokumentoj ne estis inertaj, statikaj sed forte dinamikaj - la praktikantoj de la lingvo havis eblecon iom post iom kaj kvante, kaj kvalite evoluigi la tekston kaj poste tiu evoluado de la teksto reagis al la evoluigo de la lingvo. La fenomeno jam naturiĝas kaj estas jam tute simila al la etnikaj lingvoj, kvankam en la lingvoevoluiĝo ofte partoprenas aŭtoritatuloj, elstaraj verkistoj kaj ne la amaso mem. /Sed tiu fenomeno estas bone konata ankaŭ en la naciaj lingvoj. Ni citu la eminentan sovetan lingviston Serebrennikov [5]: "...ĉiu vorto kaj ĉiu formo estas komence kreita de individuo. Ĉi tiu fakto okazas pro tio, ĉar la kreado de iu vorto aŭ formo postulas iniciativon, kiu, pro tuta vico da psikologiaj kaŭzoj, ne povas esti rivelita de ĉiuj membroj de la koncerna socio. Samtempe la iniciativo de la unuopulo ne estas fremda, el pure gnoseologia vidpunkto, por la aliaj socianoj. La komuneco de psikofizika organizaĵo de ĉiuj homoj, la ekzisto de la socia konscio, la komuneco de asociacioj ktp. kreas la t.n. socian potencialon, t.e. la eblecon samforme iniciati, en la sama direkto. Tiu estas la respondo al la demando, kial la kreiĵo de unuopa individuo estas akceptebla kaj konfirmebla far la tuta socio... La novaj aperaĵoj fiksiĝas en la lingvo ĉar ili ne kontraŭas la socian potencialon krei analogajn aperaĵojn. Potencialo kongruas kun la socia potencialo krei saman vorton aŭ formon, tiam la nova vorto kaj la nova formo estas akceptita en la lingvo kaj firmiĝas en ĝi..." /pp. 441-442/.

La kontinua kvanta evoluado, kvankam ne tute senbrue, transsaltis en kvalitatan evolugradon: el la primitiva periodo en la duan, klasikan periodon.

1.5. La bazaj lingvistikaj dokumentoj de la dua periodo estas: La Plena Vortaro, La Plena Gramatiko kaj La Parnasa Gvidlibro.

Se Zamenhof kreis la minimuman lingvon, Kalocsay kaj Waringhien konstruis la klasikan lingvon kaj ĝian dokumentaron.

Ĉiam, kiam en historio la evoluado devas abrupte transpaŝi pli krutan sojlon aperas la kontraŭstaro, la konservativeco /vd/ "neologismaj" diskutoj, ofte kvereloj/. La pli altnivela literaturo postulis literaturajn neologismojn, la aperintaj novaj realaĵoj - teknikajn neologismojn, la sciencaj studoj - fakterminojn, la etnikaj priskriboj - etnonimojn /same kiel ĉe Zamenhof la tradukado de Biblio la bibliismojn!/. La plivastigo de lingvouzo kaj praktiko paralele plivastigis la lingvokadrojn, ĉefe la leksikon. Dum ĉi tiu dua periodo saturaĝas la leksiko kaj la uzantoj ricevas vastan, elastan, dinamikan normativon por pluevoluigi la lingvon.

La neologisman-diskuton, cetere, kaŭzis simpla miskompreno. La konservativaj primitivuloj tute simple ne komprenis, ke ne ĉio, kio ne estas Fundamenta estas nepre kontraŭfundamenta. Ili simple ne konis la nocion "Superfundamenta". Se ni neus la vivrajton de superfundamentaj elementoj /estu ili leksikaj aŭ gramatikaj/ ni tute simple mumiigus la lingvon en ĝia plej primitiva stato, rezignus pri ĝia evoluado - unuvorte: mortigus ĝin.

La tempo konfirmis la progresemlulojn.

Surbaze de la Dua-Fundamento evoluis la lingvo, la literaturo kaj la lingvo esploro. En la libera evoluigo de la lingvo partoprenas jam ne nur opaj aŭtoritatuloj, sed la lingvouzantoj mem. La tasko de lingvistoj estas nuntempe ne "verki" novajn leksemojn kaj gramatikajn kategoriojn, sed esplori, observi kaj analizi la tekstojn /jam ne nur skribitajn sed ankaŭ parolatajn/ kaj registri la novajn aperaĵojn.

Inter la apero de Fundamenta Gramatiko kaj Plena Gramatiko forpasis 48 jaroj. Depost la apero de Plena Gramatiko forpasis 35 jaroj. Sed en niaj tagoj la tempo multe pli rapidas ol antaŭe! Dum ĉi tiuj 35 jaroj vaste evoluis la lingvo kaj krute ŝanĝiĝis la lingvistika koncepto. Ne nur la literaturo transpasis el la dua periodo en la trian. Kiel ni demonstris, tiu ne estintus ebla, se samtempe ankaŭ la lingvo ne estus transpasinta la saman sojlon. Eble la lingvistoj ĝis nun ne rimarkis tiun fenomenon. Sed: "temp' está!".

La moderna periodo en Esperanto lingvistiko

2.1. Kio karakterizas tiun periodon?

1. La koncepto de la moderna lingvistiko favoras Esperanton: tute simple oni ne povas ĝin preteriri ĉar la problemo de interlingvistiko estas esenca kaj konstrua elemento de la moderna lingvistika koncepto. Se en la antaŭa periodo la lingvistoj senrimarke preteriris Esperanton kaj estis kvazaŭ honto okupiĝi serioze pri ĝi en sciencaj verkoj, en la nuna periodo Esperanto fariĝis objekto de la lingvistiko.

2. Esperanto eniris la modernan lingvosciencan sed la opinio pri ĝi ne multe ŝanĝiĝis. La lingvistikaj verkoj okupiĝas pri Esperanto ĉar ili ne plu povas ĝin ignori sed apenaŭ troviĝas sciencaj verkoj en kiu troviĝu favora, pozitiva opinio pri la Internacia Lingvo. La lingvistiko apartigis ĉapitron, kadron al Esperanto sed neniu lingvisto entreprenis okupiĝi serioze pri la scienca analizo kaj esploro de la problemo. La filologoj atendas de la Esperantistoj-lingvistoj, ke ili liveru la sciencan materialon pri la Internacia Lingvo. Kaj tiu materialo /ni konfesu/ ĝis nun mankas. En la tria periodo kreskas, do, la respondeco de fakaj lingvistoj.

3. Por donti la sciencan analizon de la Internacia Lingvo, oni devas transpreni ankaŭ en la Esperanto-lingvistiko la modernan lingvistikan koncepton. La evoluado de iu scienco antaŭkondiĉas ne nur novajn metodojn. Ankaŭ la koncepto pri la esplorata objekto ŝanĝiĝas. Tial, la volumeno de la koncerna scienco ankaŭ ŝanĝiĝas: en kelkaj partoj vastiĝas en aliaj malvastiĝas ĝiaj limoj.

2.2. Por konkrete demonstri la tezojn de 2.1/1-3 ni elektis kelkajn argumentojn el la lingvistika literaturo:

Al 2.1/1: Estas rimarkeble, ke inter la iniciatintoj kaj pioniroj de la nova lingvistika koncepto troviĝas multaj eminentaj lingvistoj, kiuj siatempe serioze okupiĝis pri la interlingvaj problemoj /ekz. Leibnitz, Jespersen, Baudouin de Courtenay ktp./ . La moderna lingvisto jene aludas al tio: [6]
"Por lingvistika semiofiko la ideo de Leibnitz, la antaŭulo de Zamenhof /esperanto/ kaj de Beaufront /ido/ estas signifa ne kiel triviala provo krei lingvon, kiel opinias kelkaj lingvistoj, sed kiel scienca fundamento de semiotika modeligo surbaze de natura lingvo, modeligo, kiu entenas ankaŭ la evoluprincipon, bazitan sur la laŭperiode efektiviĝanta konvencieco".

Al 2.1/2: Resumante la starpunkton de la lingvistoj estas konstateble, ke:

a/ Esperanto estas akceptita kiel semiotika signosistemo;

b/ Esperanto estas rekonita kiel antaŭcibernetika lingvomodelo;

c/ sed ne estas akceptita kiel lingvo en la senmanka senco de tiu vorto.

Ni trarigardu kelkajn opiniojn:

Laŭ VOLKOV [6] la tabelo de semiotikaj signalaroj aspektas jene:

karaktero de komunikado	strukturo		interrilato inter elementoj interne de la strukturoj
	simpla	kompleksa	
motivita /determinita/ statika	ekz. "jes"- "ne" simboloj	la lingvo de bestoj	1. opozicioj 2. fermiteco
probabla, dinamika	skribo	lingvo	1. opozicioj 2. nominantoj, operatoroj 3. aperteco
KONVENCIA statika	La signalaro de la surstrata trafiko	la signalaro de la matematiko; esperanto	1. opozicioj 2. nominantoj, operatoroj 3. fermiteco

DENISOV [7] akuzas la "seriozajn" lingvistojn, okupiĝantaj pri interlingvistikaj problemoj, ĉar ili:

"kontribuis al la dissemado de diversspecaj romantikaj mitoj, kreitaj poste de nekompetentaj entuziasmuloj..."

Lia skeptikeco konkretiĝas jene:

a/ Esperanto ne povas eviti la fonemikan kaj semantikan evoluadon, sekve ĝi nepre disdialektiĝos;

b/ la kriterioj de "lingvosimpleco" ne estas konataj, sekve, estas neserioze paroli pri la "simpleco de Esperanto";

c/ estas neĝuste nomi tiajn lingvojn kiel Esperanto "logikaj". Cetere, ne la reguleco de paradigmoj gravas, sed, kiel jam Descartes emfazis: la "enhava" plano de la lingvo.

d/ estus bezonata ia "dekreto" laŭ kiu la tuta homaro akceptu unuecan lingvon, kiel ekz. Esperanto. Sed tia dekreto estas utopio.

[Tamen, ni notu, ke DENISOV tute klare difinas la interlingvistikon, "la scienco pri la internaciaj helplingvoj", kaj klasigas ĝin kiel "precibernetika - antaŭcibernetika - lingvomodeligo".]

KONDRATOV [9] - kvankam lia verketo estas plie popularsciencia, tamen pro la konstato estas citinda: Laŭ lia opinio, la disvastiĝon de artefaritaj internaciaj lingvoj malhelpas ne ilia lingvistika karaktero sed sociaj kialoj. "Iu lingvo disvastiĝas nur tiam, kiam sen ĝi oni ne povas ekzisti" /p.145/. Li rekonas: "Memkompreneble, estus bone havi facilan internacian lingvon por la sciencaj interrilatoj. Estu ĝi Esperanto. Por hungaro, japano aŭ somaliano estus pli facile skribi en Esperanto ol aktive lerni iun vivantan fremdan lingvon..." /p.146/. Sed, ĉar en Esperanto ne estas sciencia literaturo la inĝenieroj, kemiistoj, medicinistoj ktp. lernas tiun lingvon, kiun ili povas utiligi: la rusan, anglan, francan... Kaj konkludas jene: "la feraj leĝoj de la scienco, nomita lingvosociologio, malhelpas la artefaritajn internaciajn lingvojn enpenetri en la vivon". Tamen li rekonas, ke la ĝisnuna laboro de la interlingvistoj ne estis vana: ili antaŭpreparis la terenon al alitipa interlingvo. Ankaŭ la hodiaŭa lingvoscienco serĉas internacian lingvon - sed ne por la homoj, sed por la maŝinoj /p. 146/.

SEREBRENNIKOV [5] komparante la kreolajn kaj pidĝinajn lingvojn konstatas; "...la pidĝinoj ludas la rolon de helpaj lingvoj kun tre limigita sfero de funkciado /ĉi-lastaj trajtoj karakterizas ankaŭ la artefaritajn helplingvojn, kiel Esperanto kaj Ido/" /p. 288-289/.

Laŭvorte konsentas kun la supra opinio pri la limigiteco de funkciadsfero alia elstara soveta lingvisto REFORMATSKIJ [8]. Cetere lia starpunkto estas unusence negativa:

Citaĵoj:

a/ "Ĉiu simila "laboratoria inventaĵo" povas havi sukceson nur en certa praktika medio, ne pretendante esti lingvo en la plena senco de tiu ĉi vorto".

b/ "Similaj "suplementaj rimedoj de interkomunikado" estas senigitaj de la fundamentaj kvalitoj de la vera lingvo: tutpopola bazo kaj viva evoluo, kiom ne anstataŭas la orientiĝo al internacia terminologio kaj al la oportuneco de vortfarado kaj frazkonstruo" /p. 524/.

c/ "...en Esperanto aperis ne nur lernolibroj pri Esperanto sed ankaŭ diversa literaturo inkluzive beletristiko, kaj tradukita kaj originala; ĉi-lasta apenaŭ estas subtenebla, ĉar, malgraŭ ĉiuj sukcesoj, Esperanto kaj similaj lingvoj restas akcesoraj kaj "priaferaj" t.e. ekzistantaj ekster la stilistiko."

Noto: La verko estas lernolibro por la filologiaj fakultatoj de pedagogiaj institutoj; 4-a eldono aperinta en 100 mil ekzempleroj!

/Pri la kritiko de tiuj asertoj vd! mian artikolon en HV [10]./

Unu el la plej eminentaj nuntempaj lingvistoj, Yehoshua BAR-HILLEL recenzante la verkon de J.A.FODOR kaj J.J.KATZ [11] kritikis ilian difinon pri la "lingvistika teorio". La teorio de menciitaj aŭtoroj aspektas jene: La lingvistika teorio estas tiu metateorio, kiu okupiĝas pri la problemoj de la lingvistika priskribo de naturaj lingvoj". Ĉi-koncerne BAR-HILLEL ne konsentas pri la limigo de la teorio al "naturaj lingvoj" kaj demandas: se la lingvistika teorio okupiĝas nur pri naturaj lingvoj, kiu teorio okupiĝos pri la "konstruitaj lingvoj" - estu ili inventitaj far logicistoj aŭ produktitaj far komputiloj, alinome pri 'programitaj lingvoj' respektive "artefaritaj lingvoj" kiel ekzemple Esperanto? Kvankam estas diferencoj inter tiuj lingvoj, tamen, ili havas tiom da similaj trajtoj ke estas la tasko de lingvistika metateorio okupiĝi pri ili!

V. VILDOMEK analizas sian demandilon, dissenditan al 470 individuoj de la "multlingva kultura Eŭropo" /loke: Luksenburg, Strasburgo kaj iu internacia studenthejmo en Danlando/. Li ricevis nur 61 respondojn. El inter ili akcepteblaj estis nur 40: 24 viroj kaj 16 virinoj, 20-70 jarojn aĝaj. 24 el inter ili estis lingvoinstruistoj, 2 el la respondintoj parolis 7 lingvojn, 3 - ses lingvojn, 16 - kvin lingvojn. Laŭ lingvoj: 38 parolis france, 36 - germane, 30 - angle kaj 6 - Esperante. Sen akcento parolis fremdan lingvon nur tri personoj, ĉiuj Esperanton. Ĉi konstato de la aŭtoro pridubas la recenzisto [12] p.187.:

"One wonders what Esperanto without accent sounds like and what standard was applied".

Konkludoj

La citaĵoj ne estis hazarde elektitaj; ili ĉiuj montras iun el mankoj de nia ĝisnuna laboro.

3.1. Ilia plejparto originas el ne ĝusta kono de la problemoj: la lingvistoj nuntempe jam okupiĝas pri Esperanto sen ĝusta kono de la esenco. Sed, ke en

lingvistiko Esperanto ne estas konata aŭ estas miskomprenita estas peko de la Esperanto-lingvistoj: ni tutsimple ne havas lingvosciencan literaturon!

[Mi citos du kolegojn: Scienc esploristo el la Sciencia Akademio petis min proponi al li iun lingvistikan verkon en iu ajn "granda" lingvo pri la lingvosciencia analizo de Esperanto. Docento pri la ĝenerala lingvistiko en nia Universitato rimarkis: "Dum la surstrata, ofte banala propagando la esperantistoj forĝis prezenti al la scienca mondo la lingvosciencan analizon de la lingvo mem.]

3.2. Ni observu konkrete kelkajn taskojn, eltiritajn el la citaĵoj:

a/ Ne estas klare difinita la loko de Esperanto en la sistemo de sciencoj /semiotiko, ĝenerala kaj speciala lingvistiko, interlingvistiko/;

b/ Ne ekzistas socilingvistika verko el kiu evidentiĝus tiu "socia bazo", en kiu funkcias kaj evoluas la lingvo;

c/ Ne estas esploritaj la evolutendencoj de la lingvo kaj ĝiaj internaj evoluleĝoj;

d/ Kelkaj branĉoj de la leksikologio estas tute neglektataj: la semantiko, la etimologio, la frazeologio, la leksikografio;

e/ Mankas la precizaj parametroj de opaj Esperanto-sonoj /fonetika normativo/; tute mankas la Esperanto-fonologio.

f/ Ne estas konata la fonetika distordo de Esperanto sur diversaj artikulataj bazoj, sekve estas malfacile science rifuti la spekulativan teorion pri la "disdialektiĝo";

g/ Nek kvante, nek kvalite evoluas la fakscienca literaturo en Esperanto. La diversfakaj esperantistoj verku esperantlingve en sia fako. La lingvistikajn problemojn lasu al la lingvofakuloj!

Kaj mi povus daŭrigi.

3.3. En la enkonduko de la jena artikolo mi diserigis "Esperanton" je kvar komponentoj, sed mi parolis nur pri la lingvo kaj ĝia esplorado. Tamen, kiel dirite, neniuj komponento povas evolui memstare. Sen la oficialigita, moderna instruado kaj sen altnivela, serioza kaj moderna organiza laboro nia afero plu stagnos. En ĉiu periodo la subevolueco de la Movada agado kaŭzis la fiasojn. Ni esperu, ke en la tria periodo ankaŭ la Movado kapablos transsalti la sojlon! Se ne, la ofte superhoma laboro kaj la enormaj temp- kaj energi-investadoj de unuopuloj alportas nur detalrezultojn.

- [61] "Ovidlibro por supereksamenon", vol. 2, "Skizo de Esperanta Literatura", pp. 87-88.
- [62] W. Auld: "Enkonduko" al Esperanta Antologio, La Laguna, 1958, p. 11.
- [63] Dr. Szerdahelyi I.,: "Nemzetközi nyelv - nemzetközi irodalom" /'Internacia lingvo - internacia literaturo'/' "Nagyvilág", mondoliteraturo revuo, aŭgusto, 1966., pp. 1220-1224.
- [64] Antal L., Tartalom, jelentés, megértés, /Enhavo, signifo, kompreno/, Nyelvtudományi Közlemények, vol. 65., 1963; 439. p.
- [65] Общее языковедение, отв. ред. Б. А. Серебрянников, Изд. "Наука", М. 1970.
- [66] А. Г. Волков, Язык как система знаков, Изд. Московского Университета, Москва, 1966, p. 23.
- [67] П. Н. Денисов, Принципы моделирования языка, Изд. Московского Университета, 1965.
- [68] А. А. Реформатский, Введение в языковедение, Изд. "Просвещение", Москва, 1967.
- [69] А. Комратов, Звуки и знаки, Изд. "Знание", Москва, 1966.
- [70] D-ro István Szerdahelyi: Esperanto kaj la moderna lingvoscienco, "Hungara Vivo", 1970/2 kaj 1970/3;
- [71] The structure of language, Edited by Jerry A. Fodor and Jerrold J. Katz, Recenzo: Jehoshua Bar-Hillel, University of California, "Language", Journal of the Linguistic Society of America, Vol. 43, N-ro 2/1967/ pp. 530-531.
- [72] V. Vildomec, Multilingualism, Leyden, 1963; Recenzo: W. F. Leopold, "Language Journal of the Linguistic Society of America, Vol 41, N-ro 1 /1965/ pp. 100-105.

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 24 n-ro 2/3(100/101) 20.5.1973.
--	---

DU LITEROJ - MULTAJ PROBLEMOJ

- pri la esperantaj j kaj ŭ -

/ A. Albault, TOULOUSE, Francio /

La naturo de la Esperantaj sonoj prezentataj per la literoj *j* kaj *ŭ* estas unu el la plej tiklaj punktoj en la Esperanta fonetiko. Ne estas konata verko, kiu funde traktus ilin. Ĉi-sekve mi nur levos kelkajn demandojn, sed neniel pretendas prezenti definitivan tezon pri ili.

Foririnte de la efektivaj literkombinoj - kaj mi limigos min al tiuj troveblaj en la Fundamento por doni samtempe bildon finitan kaj plenan -, mi raportos la opiniojn de la diversaj aŭtoroj. Poste, por iom ordigi la nociojn, mi proponos kelkajn difinojn; fine, mi diskutos kelkajn problemojn de fonetismo kaj de grafismo. La konkludon mi lasos al la publika opinio kaj al la bona uzo.

* *

Kiel sciante, la du literoj *j* kaj *ŭ* formas ne nur la grupojn *aj*, *ej*, *oj*, *uj*, *aŭ*, *eŭ*, kiuj en sia tuto estas tiom karakterizaj de la Esperanta elparolo kaj skribo, sed ankaŭ la grupojn *ja*, *je*, *jo*, *ju* troveblajn en multe pli da lingvoj. Plie ili formas aliajn grupojn, kiel *oŭ*, *ŭa*, *ŭe*, *ŭo* ... kiuj penas penetri en la lingvon. Ni ankaŭ citu *ij* kaj *ji*, kiuj almenaŭ teorie estas eblaj. Fine ni ne forgesu la kombinojn, kiujn *j* formas kun diversaj konsonantoj: *nj*, *lj*, ..

Se nin limigi al la sola Fundamento, ni nombras 83 radikojn (kaj aliajn elementojn), kiuj entenas po unu *j*. Ni povas klasii ilin jene:

A. 36 radikoj kun *j* silabokomence:

1. *iniciales* (18): *ja*, *jam*, *Januaro*, *jaro*, *jes*, *jugo*, *juglando*, *juĝi*, *juki*, *Julio*, *juna*, *jungo*, *Junio*, *junipero*, *jupo*, *juro*, *justa*, *juvelo*.
2. *inter du radikaj vokaloj* (9): *bajoneto*, *cejano*, *fajenco*, *kajero*, *kajuto*, *krajono*, *majesta*, *projekto*, *vojaĝi*.
3. *antaŭ finaĵo* (9): *boĵi*, *ejo*, *foĵo*, *fajlo*, *gaja*, *ĝoĵi*, *leĵo*, *Majo*, *vojo* (silabi: *boj-i*, ... *ŝajnas* al mi nerealece)

B. 35 radikoj kun *j* silabofine aŭ antaŭ konsonanto:

1. *antaŭ l* (10): *ajlo*, *emajlo*, *fajli*, *gajlo*, *hajlo*, *kanajlo*, *najlo*, *pajlo*, *tajloro*; *mejlo*.
2. *antaŭ n* (9): *ajn*, *gajni*, *grajno*, *ŝajni*, *semajno*; *vejno*: